

Leterkesto, respondo al Richard Howard.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1990 oktobro 25.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-22/SRI-1990-22-B-6-Claude-kaj-Andree-Gacond-Leterkesto-respondo-al-Richard-Howard.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni daŭrigas nian babiladon kun la aŭskultantoj, kies mesaĝoj replenigis nian leterkeston.

Richard HOWARD sendis tri mesaĝojn, du el Tonghua, Ĉinio, maje kaj junie, kaj tria el Northampton, Britio, julie. Ni citu lin :

A.- Al mi plaĉas la "Leterkesto"... Mi ĝuas la okazon aŭdi alies ideojn kaj ankaŭ profitas de l' okazo povi kontakti aliajn aŭskultantojn-korespondantojn.

Cl.- Richard HOWARD estas poligloto, kiu sentas mankojn rilate al esperanto. Ni citu lin:

A.- Multaj esperantistoj serĉas en nia lingvo "internan ideon" kaj vidas en la uzado de la lingvo ian "-ismon". Mi al ili ne apartenas. Por mi esperanto (minuskle) estas nura lingvo kaj ĝi servas al interkompreniĝo inter homoj, kiuj strebas ĝin bone ellerni. Same bone al mi servas la rusa lingvo en Pollando kaj Bulgario, kaj ankaŭ fojfoje eĉ en Ĉinio, la franca lingvo en Rumanio kaj la germana en Hungario. Mi scias, ke laŭdire esperanto estas lingvo facile lernebla kaj ke ĝi estas la lingvo gepatra de neniu nacio. Tie kuŝas eble malavantaĝo ! Multaj esperantistoj restas eternaj komencantoj. Aliaj iom progresas sed ne kapablas aŭ simple ne provas internaciigi sian stilon kaj sian prononcon. Se mi lernas ies nacian lingvon, mi facile povas trovi modelon, mi povas konsultiĝi kaj demandi "Kiel diri tion?", "Kiel esprimi jenon?" Kaj se mi lernas esperanton? Kies prononco-manieron, kies parolturnojn mi imitu? Eble via "Leterkesto" trovos respondon al tiuj demandoj!

Cl.- Tiuj asertoj de Richard HOWARD estus tre bona enkonduko al plurtaga diskuto, unue pri la sinteno, kiu certe distingas la esperanto-praktikantojn de la neesperantistoj. Laŭ mi la esperanto-praktikantoj tendencas konsideri la aliajn parolantojn, kiel egalulojn, kiel homojn, kaj tio certe akcentas la interhoman unuecon. Ne estas dubo, ke al la samo oni povas strebi per naciaj idiomoj, kiam ili rolas kiel interlingvoj. La lingvoj angla, ĉina, franca, germana, hispana, rusa, ktp, povas konduki al transnaciaj, superetnaj, interhomaj kontaktoj, ĉefe kiam ilin praktikas inter si ne denaskuloj. Pere de la germana mi havis multajn kontaktojn kun alemanoj en Svislando mem, kun poloj, hungaroj, ĉeĥoj, jugoslavoj. Inter ni ĝi ludas la rolon de interlingvo. Sed tiun ĉi rolon ĝi ĉesas ludi, kiam en la diskut-grupo troviĝas denaskaj germanparolantoj. Tiam tuj kreiĝas du tavoloj da parolantoj: tiuj, kiuj korektas la lingvaĵon de la aliaj, kaj tiuj, kiuj ne plene regas la lingvon. La etoso ĉesas esti interhoma, ĝi revenas al la germano-centrismo. Lingve pravas nur la denaskuloj. La samon spertas multaj uzantoj de la angla lingvo. Estas pli agrable konversacii en ne-ĉeesto de anglo, usonano aŭ novzelandano. Tiam la angla estas reala interlingvo. Sed por la orelo de anglo-lingvano, tiu interlingvo estas nur reduktita angla lingvo. Eĉ se li tion ne diras, lia nura pli riĉa, pli preciza lingvo-uzo komprenigas al la neangloj, ke ilia lingvouzo estas speco de 'basic english'. German- kaj ital-svisoj, kiuj interrilatas pere de la franca, uzos multajn formulojn, kiujn franclingva sviso

rifuzos uzi kaj emos reformuli per por li vera franca lingvaĵo. Tiam ĉesas regi egaleco. Kunestas franclingvano kaj ne-franclingvanoj uzantaj la francan por interlingvaj rilatoj. Tre malofte ne-franclingvanoj fariĝos realaj lingvaj egaluloj por la franclingvanoj. Tiel estas por ĉiuj lingvoj, kiam ili rolas kiel interlingvoj. Tiel ne estas por esperanto, kiel verŝajne tiel ne estis por la latina lingvo en mezepoko.

Richard HOWARD prave rimarkigas, ke multaj esperantistoj ne regas esperanton. Li nomas ilin ne esperantistoj, sed esperUNTistoj. Ekzistas do de la tutkomencantoj ĝis la lertaj parolantoj tuta serio da ŝtupoj en la lingvopraktikado. Sed tiel estas por ĉiuj interlingvoj. Ankaŭ la anglan fuŝparolas eternaj komencantoj. Tion oni povas konstati, kiam oni aŭskultas gejunulojn en junulargastejo. Kun granda ĝojo ili interŝanĝas pli malpli stereotipajn vidpunktojn helpe de la lingvaĵoj, kiujn ili pli malpli bone asimilis. Ilia admiro iros al tiuj, kiuj plej lerte kapablas manipuli la interlingvon. Al la angloparolanto, kiu subite intervenas, oni ofte diras, ke lian anglan oni ne komprenas. Laŭ la komunikbezonoj oni strebas al perfektigo, aŭ ne. En multaj esperanto-rondoj, kies plej alta idealo estas simple interŝanĝi insignojn aŭ poŝtkartojn, oni kontentiĝas je tre elementa uzo de la zamenhofa lingvo. En la grupoj, kiuj interesiĝas pri beletraĵoj, pri tradukaĵoj, pri arto aŭ scienco, la esperanto-nivelo estas pli alta. Kaj estas en tiuj rondoj, ke oni faras al si la demandon pri la imitindaj kaj ne-imitindaj prononcm manieroj aŭ parolturnoj. Reciproka lingva korektado kaj komunikado kun samcelaj rondoj kondukas tute certe la praktikantojn de la zamenhofa lingvo al kreskanta unueco kaj al certecoj pri la imitindaj normoj. La modelo ne estas trudata el la ekstero. Ĝi estas iom post iom malkovrata pere de la praktiko, kondiĉe, ke ĝi efektiviĝu en etoso de profunda respekto por la lingvo mem. Mi pli kaj pli dubas, ke simila lingva fenomeno ekzistas por la naciaj lingvoj ludantaj la rolon de interlingvoj. La normo estas donita.

Poligloto, kiel Richard HOWARD, sentas la mankon de trudita normo por esperanto, kiel malavantaĝon kaj malforton. Atenta ekzameno de la originala situacio de esperanto malkovrigas, ke tiu malforto fakte estas potenco kaj avantaĝo. La esperanto-komunumo estas aŭtonoma. En si mem ĝi devas trovi la propran unuecon. Per la praktikado mem de la propra lingvo, ĝi iom post iom malkovras ties spiriton kaj karakterizaĵon.

A.- Jozefo KISS en Galyatető, Hungario, komencis relegi la romanon "Pro Iŝtar" de Luyken, post aŭskultado de la elsendo de Pascal DUBOURG pri tiu esperanto-romano. Li diras : Mi bedaŭras, ke mi ne povis surbendigi la prelegon... Malgraŭ onidiroj mi ŝatas tiaspecan eduktipan romanon kaj kvankam mi jam foje tralegis la verkon antaŭnelonge, mi komencis ĝin ree legadi.

Cl.- Saluton al Jan KLOCEK en Wloclawek, Pollando, ni ankaŭ diras fermante nian hodiaŭan respondadon al leterskribintoj.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Diras al vi, 'Ĝis reaŭdo !' Claude kaj Andrée GACOND.